Gazeto de Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio (SATEB)

# La Verda Proleto

**Journal of SAT in Britain (SATEB)**

Numero 416 ~~~ Julio 2001

## PLIVASTIGU VIAJN FLANKOKUPOJN

Mi foje renkontas relative nov-lernantojn de Esperanto. La lingvo-nivelo kompreneble multe varias. Kelkaj facile lernas lingvojn, aliaj disponas pri multe da tempo. La kvalito de instruado varias, ankaŭ la akordiĝo inter la kurso kaj la lernanto. Super tio tamen montriĝas ke tiuj kiuj havas tuijan ke relative gravan uzon por la lingvo pli rapide lernas.

Ekzistas pluraj specialistaj grupoj aŭ asocioj de Esperantistoj. Kelkaj ekzistas kiel frakcioj aŭ fakoj de S.A.T. Inter tiuj troviĝas Liberpensula, Ekologiisma, kaj Sennaciisma frakcioj.

Kelkaj demandas - se SAT estas, laŭ ĝia nomo, sennacieca, kial necesas havi apartan sennaciisman frakcion? La respondo estas ke SAT estas sennacia en ĝia organizado, kaj demokratio. Ĝia ĉefa rolo estas ebligi komunikon inter anoj kaj grupoj kun diversaj "politikaj" vidpunktoj, sen mem aktivi en iu specifa kampo, do ĝi ne mem promocias Sennaciismon.

(*Tiuj kiuj preferas trakti la aferon gramatike povas konsulti vortaron kiu klarigas la diferencon inter "-eca" kaj "-isma"*)

Abundas eblecojn plivastigi vian vivon, aŭ per la SAT frakcioj, aŭ rekte kun aliaj SAT-anoj, aŭ en la paĝoj de Sennaciulo, aŭ per aliaj Esperato-uzantaj grupoj. Traktu Esperanton kiel ilo por viaj propraj interesoj., kaj se vii provas ĝin dum vi lernas, vi verŝajne progresos pli rapide.

Arturo Prent

[Lingva punkto: La Angla versio ne estas rekta traduko]

(Por informo pri SAT, vidu paĝo 10
pri SATEB - SAT en Britio - vidu paĝo 9)

## BROADEN YOUR HORIZONS

I occasionally meet people who are in the process of learning Esperanto. The rate of progress varies a lot. Some people learn languages easily, others have more time available. There is also variation in the quality of instruction, and in the match between student and course. More than this, it turns out that those who have an immediate and important use for the language learn quicker.

There are many special interest groups or associations of Esperantists. Some of these are linked or affiliated to SAT. Amongst these are Freethinkers, Ecology supporters and Non-Nationalists.

Some people ask why SAT (literally Non-nationalistic Worldwide Association) needs such an affiliate. The answer is that SAT is non-nationalist in its organisation and democracy. Its main aim is to ease communication between members and groups of varying "political" viewpoints, without itself taking a particular stance. It does not promote non-nationalism in its own right.

(*Those of a grammatical turn of mind could look up the difference between "-ist" and "-istic"*).

There are plenty of possibilities through SAT, one of its affiliates, the pages of its journal, or other groups using Esperanto, to broaden your horizons. Treat Esperanto as a means to pursue your own interests, and if you have a go while you are still learning, you will probably get on that little bit quicker,

Arthur Prent

(For information about SATEB, the link to SAT
in Britain, see page 9

# * S.A.T.E.B *

(Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio - *SAT in Britain*)


Prezidanto / *Chairperson* Mrs. Pearl Simons, 'The Cottage' 34 Beaulieu Drive, PINNER, Middx HA5 1NG
Tel: 020 8429 3531

Sekretario / *Secretary*: Anne Johnson, 42 Beresford Road, ISLINGTON. London N5 2HZ.
Tel: 020 7359 8102

Kasisto / *Treasurer*: Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex CM13 1EJ
Tel: 01277 228962. <arturo@signalprent.demon.co.uk>


Redaktoro de / *Editor of* La Verda Proleto: Dum la manko de redaktoro, la komitato agas kiel redaktora komitato, kaj Alan Gould afable akceptis presi kaj elsendi ĝin.
*In the absence of an editor, the committee is acting as an editorial team, and Alan Gould has kindly agreed to print and dispatch it.*

Bonvolu sendi viajn kontribuaĵojn / *Please send your contributions:-*
per reto al / *by email to*: **<arturo@signalprent.demon.co.uk>**
diskoj al la **kasisto** -adreso supre / *discs to the **treasurer** -see address above*
paperaj kopioj al / *paper copies to* Ian MacDowell, 40 Danehurst Rd., Wallasey, Cheshire, CH45 3JJ

**Pri la enhavo de artikoloj kaj leteroj respondecas nur la aŭtoroj mem**
***Views expressed by contributors are not necessarily those of the organization***

## ANONCOJ

**KOTIZOJ 2001**

**AL LA MALFRUINTOJ - PAGU NUNU VIAN SATEB KOTIZON por 2001**
aŭ ni ne plu povos sendi "La Verda Proleto"-n. - formularon je paĝo 9
**LATEPAYERS - PAY YOUR SATEB SUBSCRIPTION for 2001 NOW**
or we won't be able to send you "La Verda Proleto" any more - form on page 9
(SAT-anoj povos uzi la formularon ĉe paĝo 10 por SAT kotizoj por 2001)

## SATEB ELEKTO

| | |
|---|---|
| Prezidanto | Pearl Simons |
| Sekretario | Anne Johnson |
| Kasisto | Arturo Prent |
| LVP | Cxar ni ne sukcesis trovi redaktoron, kelkaj komitatanoj agos kiel redaktora teamo. |
| Kont-kontrolisto | Ian Mac Dowall |
| Libro-Servo | Paul Hewitt |
| Publico | Paul Hewitt |
| Gazetoficulo | Paul Hewitt |

### ESPERANTAJ SINDIKATISOJ

Georges Sossois klopodas kompili liston de Esperantaj sindikatistoj por ke la kontaktoj ekzistu por internacia agado. Se vi konsentas ke via nomo kaj tio de via sindikato troviĝu sur tiu listo, bonvolu sendi mesaĝon al Georges ĉe: -

### *ESPERANTO TRADE-UNIONISTS*

*Georges Sossois is trying to compile a list of Esperanto trade-unionists so that the contacts are there for international action. If you agree to your name, and the name of your union, being on this list, please drop a note to Georges at: -*

Rue de Basson 79 6001 MARCINELLE, Belgium / Belgique Tel / fax: +32 71 43 62 05

### LVP 417

Kontribuoj invitataj - limdato fino de septembro
*Contributions are invited - to reach us by the end of September*

## NEKROLOGO

### Frank Maitland 1909 - 2001

La vivo de Frank Maitland estis plen-plene de politikaj kaj Esperantaj agadoj. Dum multaj jaroj li loĝis en Edinburgo (Skotlando) kaj en 1930 li aliĝis al la Komunista Partio. Li iĝis la gazetoficulo por la Komunista candidato en Centra Edinburgo dum la nacia elekto en 1931.

Lia unua vera kontakto kun libroj kaj eldonado okazis kiam li estris la Socialista Libro-vendejo en Edinburgo de 1933 ĝis 1934. Dum tio periodo li renkontis homojn kiujn havis aliajn maldekstrajn politikajn ideojn. Konsekvence li aliĝis al la "Guild of Youth" de la "Independent Labour Party".

Li aliĝis al la "Revolutionary Socialist Party" en 1936 kal iĝis regulara oratoro ĉe "La Mounnd" dimanĉe, kaj ankaŭ li iĝis la redaktoro de la ĵurnalo "The Socialist". Dum tiu periodo la korespondis kun Leon Trotski.

Malgraŭ tio ke lili iĝis soldaton dum la dua mondmilito, li daŭrigis la politikan laboron kiam li produktis kelkajn broŝurojn. Unu el ili The Red Army" en kiu li rememorigis legantojn pri la rolo de Trotski en la kreado de la Ruĝa Armeo. Tiam li estis elpelita de la armeo tiel rapide ke li ne povis reveni al la kazerna ĉambro por havigi siajn proprajn posedaĵojn.

Post la milito li denove laboris por la I.L.P. verkante regulan artikolon en la "Socialist Leader" uzante la nomon "Siffler". Li ankaŭ verkis por "Edinburgh Free Press", "Border News", "Russia Today", "New Leader", "Adelphi" and "Plebs". Finfine li translokiĝis suden kaj iĝis raportisto por "Hansard" (ĝi estas oficiala kroniko de la parlamentaj diskutoj). Li faris tiun laboron dum 26 jaroj. Dum tiu periodo li kelkfoje oratoris ĉe "Speakers Corner" en la parko Hyde, kie policanoj, kiuj ankaŭ laboris en la parlamentejo, pretendis ŝajne ne vidi. lin. - 2 -

Mi konstatas ke ĝis nun mi ne menciis ion ajn pri lia Esperanto agado, ĉar mi ne kontaktiĝis kun li ĝis la kvindekaj jaroj. Mi havis la respondecon (malgraŭ tio ke mi estis novbakita Esperantisto) por redakti iun britan eldonon de "Paco" por Mondpaca Esperantista Movado. La firmao, Leicester Co-operative Printers, rifuzis presi ĝin ĉar ne plaĉis al ili la politikan enhavon! Iu proponis ke mi kontaktu Frank pri la problemo. Tion mi faris kaj li ie ajn sukcesis presi la ĵurnalon kvankam ĝi ne portis detalojn de la presisto.

Poste, dum telefon-diskuto, ni ambaŭ havis la saman opinion ke estus bona ideo se estus angla-lingvajn salutkartoj por festi la unuan de majo. Li produktis ilin kaj ni ambaŭ sendis ilin al diversaj konatuloj. Bedaŭrinde ili ne stimulis intereson de niaj politikaj konatuloj kaj la salutkartoj ne estis presitaj dum sekvantaj jaroj.

Lastatempe mi malkovris la fakton ke, Frank verkis la antaŭan paĝon de la "Worker Esperantist" (nun "La Verda Proleto") por ĉiu eldono dum dek jaroj.

Nur en la lastaj jaroj de lia vivo li malgrandigis lian publikan agadon. Mia sola renkontiĝo kun li estis ĉe kunveno de la "Labour and Trade Union Esperanto Group".

Mi konstatas ke ĉi-tiu artikolo ne traktas juste al la agado de Frank pri la Esperanto Movado. Eble, unu el niaj legantoj povus aldoni al ĉi tiu historio en la venonta eldono de LVP. Mi estas dankema al Al Richardson de "Revolutionary History" por la granda parto de la informo koncerne la politikaj agadoj de Frank Maitland.

Ron Lynn

# LABOURSTART

Comrades –

Warm greetings on the occasion of your annual weekend meeting.

As you may know, LabourStart – the project I co-ordinate – is a global, online daily news service for the trade union movement. The website was launched initially with the modest goal of accompanying my book, "The Labour Movement and the Internet: The New Internationalism" (Pluto Press, 1996). But in the last four years, it has grown to become the most popular website for the labour movement with over 120,000 unique visitors every month.

LabourStart is produced by a network of over 120 volunteer correspondents from all over the world – trade union officials and staffers, journalists, students, rank-and-file activists – who search the internet every day about workers and their unions and post links to stories to our continuously-updated web page.

Until early this year, LabourStart appeared only in English and we all felt that this was severely limiting our ambitions to become, effectively, the online daily newspaper of the trade union movement worldwide. In January 2001 we announced plans to launch additional language versions of the site and very quickly created editions in Dutch, Norwegian, Swedish, French, Spanish, Portuguese and, most recently, Turkish.

Each edition is produced by local activists with knowledge of their countries. Our Turkish edition, for example, is produced by a team of a half dozen Turkish trade union members, from a variety of unions.

In addition, I launched an experimental version of LabourStart in Esperanto in early February. I publicised this to a number of individuals and organisations and you may have read about it online or in the Esperanto press.

I have long been interested in Esperanto, having purchased my first phrase book back in 1970. But only about a year ago did I begin intensively studying it, learning not only the language, but the history of the workers' Esperanto movement, especially SAT.

I've become convinced that in one sense Esperanto, as used by SAT and its allies, was in some ways like the Internet is today – a technical means that allows workers in different countries to communicate directly with each other, overcoming barriers of language and geography. It is like the Internet today, a means to rebuild the kind of labour internationalism which has been in such steep decline over recent decades.

As I read about early efforts by worker Esperantists to correspond at grassroots level and build a new, internationalist consciousness, I saw immediately the parallels to work that I and others have been engaged in since the early 1990's in using computer networks for the same purposes.

I still believe that Esperanto provides the best and cheapest means for the international trade union movement to overcome the language barrier, particularly as machine translation has yet to prove itself a viable alternative. Because I want to raise the profile of Esperanto within a labour movement which has long forgotten its existence, I have placed a link to the Esperanto page on top of the front page of LabourStart .

The Esperanto section of LabourStart will inevitably be different from all the other languages we publish in, in part because there is no source of labour news in Esperanto currently available on the net. In our other language editions, local correspondents create links to news stories which appear in their own languages, in trade union, alternative and mainstream websites. But these do not exist in Esperanto, and unlike the other languages, readers of the Esperanto section of LabourStart will come from trade union movements in many different countries and their interests will be global.

Therefore I've had to design this section of LabourStart to function somewhat differently.

My dream is to have an Esperanto section of LabourStart which will include brief translations – summaries – of the main news stories which appear in English on top of our page.

This week, for example, we're covering the international trade union demonstration taking place in London against the layoffs at Marks and Spencer, the resistance efforts by trade unionists and workers in Zimbabwe against the thuggish 'war veterans' who have been raiding factories, the dramatic bit by a British union to organise workers at the local UK branch of Amazon.com, the online retailer, and reports that Italian unions are considering strikes in light of the victory of the rightist parties headed in the recent election.

I would love to have a page on LabourStart with short summaries of each of these stories available in Esperanto for Esperanto readers.

I think having this would provide two very important services for the worker Esperanto movement:

1. It would dramatically raise the profile of Esperanto within the labour movement, particularly at international level. The thousands of workers and trade unionists who visit the LabourStart website every day are that section of the labour movement which is already most interested in internationalism and they are the obvious targets for the Esperanto movement.

2. It would provide a real service to the worker Esperanto movement which does not have a daily online news service of its own.

Because my own Esperanto is poor, and because of lack of time, I am not able to maintain this project on my own. (I am actually employed by the British trade unions to help them maximise their use of the new communications technologies; I do LabourStart in my spare time).

The work involved is actually quite minimal and requires no technical skill. To add a news story, all one needs to do is sign in to a particular page (I would assign the user names and passwords), type a few sentences in Esperanto into an online form, and click on the Submit button. That's all there is to it. The news story would be instantly added to the page.

<u>With only a minimal effort – a few minutes a day – the dream of an online Esperanto language daily labour news service could be a reality</u>

If members of SATEB were to agree to help me to take up this challenge and to maintain the Esperanto language page, we would certainly be prepared to "co-brand" the page, giving prominence to SATEB and its rôle. (We already do this with the Norwegian page of LabourStart, which is co-branded with a research centre connected to the trade union movement there).

It doesn't take great technical skills to do this - just a bit of time, a knowledge of Esperanto and English, and a commitment to the cause of trade union internationalism and the Esperanto language.

I am very sorry that I cannot attend your conference this weekend, but I do look forward in future to meeting up with SATEB members and advancing our common cause.

Thank you.

Eric Lee

Se vi povas helpi en ĉi tiu laboro, bonvolu kontakti iu-ajn en la komitato (kontakt-detaloj paĝo 2)

(*If you can help us in this, please contact anyone on the committee (addresses etc. p 2)*

## Dubinda Sukceso

La nacia baloto, kiu okazis dum majo en Britio, donis rezulton per kiu la “Labour Party” ŝajne gajnis grandan venkon. Se oni pli profunde analizus tiun rezulton, estas klare ke tiu “venko” estas iom dubinda. La nivelo de partopreno estis la plej malalta en la lastaj 80 jaroj. Nur 59% de civitanoj partoprenis, kaj nur 42% el ili voĉdonis por la LP. Kvankam en multaj aferoj la Blair registaro enkondukis plibonigojn, en ĝeneralaj ekonomiaj aferoj ĝi pli kaj pli spegulas la ideojn de la “Conservative Party”. Estas strange ke la “Liberal Democrats” nun havas, pri kelkaj gravaj aspektoj, ekzemple pli altaj impostoj por la riĉuloj, multe pli progresemaj politikoj al tiuj de la LP.

Unu el la rezultoj de tiu situacio estas ke kelkaj sindikatoj kiuj, ĝis nun, ĉiam finance subtenis la LP, komencas diskuti ĉu tiu aŭtomata aranĝo daŭru. La ĉefa afero kiu stimulis tiun demandon estas la klara intenco de la LP privatigi aŭ part-privatigi la malsanulejojn, lernejojn, malliberejojn, aer-trafikan kontrolon kaj eĉ parton de la subteran fervojon en Londono.

Oni ne povas prognozi pri la futuro kun certeco sed estas klare ke profundaj ŝanĝoj estas eblaj en la politika scenejo de Britio. Unu el la rezultoj de tiu nova situacio estas ke kelkaj malgrandaj maldrekstraj organizoj kiuj pasintece multe interbatalis, nun kunlaboras en la “Socialist Alliance”, unue nur por starigi komunajn kandidatojn en balotoj, sed eble pro aliaj politikaj aferoj. Tiu ŝanĝo estas rekta rezulto de la dekstraj politikoj de Blair-ismo.

Ron Lynn

# MONDA VILAĜO

*Se la mondo estus vilaĝo kun cent loĝantoj:*

57 estus Aziaj
21 estus Eŭropaj
14 estus el la Okcidenta Hemisfero
8 estus Afrikaj

52 estus inaj
48 estus viraj

70 estus neblankaj
30 estus blankaj

70 estus ne-Kristanaj
30 estus Kristanaj

89 estus aliseksamaj
11 estus samseksamaj

6 homoj posedus 59 procenton da la tuta monda riĉeco
kaj tiuj 6 estus ĉiuj Usonanoj

80 loĝus en subnorma hejmiĝo
70 ne povus legi
50 suferus je malsato
1 estus preskaŭ mortinta
1 estus graveda
1 estus edukita en kolegejo
1 posedus komputilon

El la interreto. Statistikoj atribuitaj al D-ro Phillip M. Harter, Stanford Universitato. Traduko Mark Palmer Januaro 2001

# PRI NACIISMO KAJ KULTURO

Leginte la tekston de Martin Lawson en la lasta Verda Proleto, mi devas reagi pri la ideoj esprimitaj en "Egaleco en Naciismo".

Laŭ mi, ĉiuj naciismoj estas problemoj. Evidente, la naciismo de la la premato malsamas tiun de la premanto - la unua penadas regajni ŝtelitan naci-identecon, kaj la dua okupas, kolonas, aŭ rabas landojn, ekonomiojn, aĵojn, kulturojn, lingvojn, kutimojn kaj identececojn de fremdaj popoloj aŭ nacioj.

Sed tio neniel signifas, ke la naciismo de la kolonito ne povas esti danĝera. Mi ne intencas kontraŭi lingvojn, vestaĵojn, ktp, el diversaj regionoj de la mondo, ĉar tiuj ne samas naciecon, kaj ne necese esprimas naciismon. Tamen, naci-fiero, naci-unueco, naci-intereso aŭ avantaĝo ĉiam devus kontraŭstari la soci-justecon.

La ideo, ke la laboristo kaj la mastro iel havas komunan intereson estas ridinda. Plue, temas pri kolonitaj popoloj kaj siaj naci-liberigo, la ideo, ke indiĝena laboristo (aŭ kamparano) kaj la indiĝena mastro devas kunigi por kontraŭi fremdan inperiismon estas grava eraro. Certe, la premato devas elekti siajn aliancanojn, sed ne forgesu, por la proleto kunigi kune kun la mastra-klaso (kiuj atendas kaj esperas iam fariĝi la venonta naci-ŝtatpovo) ĉiam estas kaj estos katastrofo. Alivorte, ĉeso de la klasbatalo neniam favoras la laboristaron.

Mi fajfas pri ĉiuj aspektoj de naciismo kaj la t.n. naci-kulturoj. Ni ĉi tie en Britio kaj eksterlandaj laboristoj havas tre komunajn vivojn (la subpremo fakte kunigas ĉiujn nin). Sed la brita proletaro kaj la brita mastra-klaso, la geriĉuloj, havas nenion komunan.

Sed ĉiuokaze, kio estas naci-kulturo? Ĝi nur estas la idearo de la loka aŭ nacia mastraklaso. Kompreneble, ni plebanoj ĉiutage devas gluti tiun kaĉaĉon por la bono de la patrolando (kaj la geriĉuloj). Fakte, la mondlaboristaro ne vere posedas sian propran kulturon, ni nur imitaĉas la kutimojn, manierojn kaj emojn de la burĝaro. Vera sendependa laborista-klaskulturo nur eblas per luktado (t.e. kulturo de rezisto).

K-do Martin, laŭ mi ambaŭ la kimra kaj la angla (aŭ io ajn) naciismoj estas senvaloraj por la laboristaro. Temas pri la kulturoj de brazilaj triboj, mi opinias ke "nacieco" ne vere interesas al ili, ĉar ili tute ne luktas reteni apartan kulturon, sed batalas haltigi genocidon aŭ etnocidon. Pri la usonaj indiĝenoj, ĉu la rezervoj nur estas ŝtat-armiloj kontraŭ la indianoj?

Jes, ni ja devas batali naci-kulturojn. Se ne, diru al mi, kiujn kulturaĵojn ni devu subteni? Ĉu la rajto drinkadi 15 pajntojn da biero vendredon vespere por piedbati iun malbonŝanculon preskaŭ ĝis morto? Ĉu la rajto eltranĉi klitorojn de junaj knabinoj? Ĉu la rajto ekspluati, subpremi, ŝteli, deklari militon, ktp?

Bonŝance, miaj propraj originaj estas tre miksitaj, do kompreneble oni malpermesus min eniri anglan hejmlandon - hejmlando sen la hinda teo, brazila kafo, amerikaj terpomoj (nur pensu, oni ne povus havi fiŝon kaj terpomfritaĵon!), la germana Beethoven, usona rok kaj ĵaz, kaj oni neniam povus renkonti belajn homojn el diversaj landoj. Plue, pro la fakto, ke la plimulto ĉi tie antaŭ havas miksitajn originojn, kiel do, oni trovus loĝantaro? Eĉ "anglo" estas fremda, ĉu ne? Ŝajnas al mi, ke neniu povas resti tie, krom se ni parolas pri specifa tipo de anglo (el la mitologiaj "bonaj malnovaj tagoj."

Tial, mi volus sugesti alian pli belan eksperimenton. Certe mondskala ĝi estus... Do ni abolu la landlimojn, la naciojn, ŝtatojn kaj kompreneble la kapitalisman fisistemon. Jes, ni provu novan tutmondan sistemon, kiu ampleksus diversecon, liberecon, solidarecon, veran egalecon, kaj soci- kaj ekonomi-justecon.

Robert Blow

## Letero

Mi ne komprenas kial oni donis spacon en LVP al la asertoj en "Egaleco en Naciismo". La plejmultoj el la frazoj estas sensencaj kaj la tuto estas ne logika kaj eĉ ofendema.

Kial voli havi areon nur por angloj, por ke la angloj povus varti sian kulturon, kiam la kulturo, tiel estas la lingvo kaj kutimoj, de la blanka angloparolanta burĝa klaso jam regas la mondon?

Ni esperantistoj scias kiel malfacile ĝi estas varbi por Esperanto (minoritata lingvo) kiam ĉiu volas/devas lerni la anglan, kiu estas bezonata labore/komputile.

Krom ĉu en Britio aŭ en (*cetera)*Europo oni vere pensas, ke "homoj rajtas vivi kiel ili volas?" Aŭ ĉu estas unu leĝo por riĉaj blankuloj kaj alia por malriĉuloj/nigruloj? Ĉu estas bonvenigitaj asilserĉantoj?

Jam la brita reĝa familio kaj la eklezio posedas multon de la tero en Britio. Ne ĉuij en la reĝa familio estas anglo. Kiam oni vidas blankulon, ĉu oni scias ĉu ŝi/li estas anglo? Trovi anglon dum vere generacioj ne estas tiom facile. Kaj kial voli tion fari?

Fine "Egaleco en Naciismo" kontraŭas la principojn de SATEB – internaciismon kaj fratecon kun la laborista klaso en ĉiu lando (kaj kompreneble raso).

Anne Johnson

## Letero

On the verdict today on the Lockerbie case, it is, of course, wrong to revenge against or punish innocent people. But let America and the West as a whole remember how much the Arab and Islamic world have been suffering from their military and hidden agenda policies during the last eight decades. Their last "feat" is the constant destruction process of Iraq through acts of war and deadly sanctions. Imagine how they feel about it.

The persecution of the two Libyans was not intended to seek justice – in what way the West has applied justice to anyone? – nor to punish Gaddafi in person. Just go back to (London) Sunday Times, September 1976, and see how the CIA saved his neck from a British task force invasion to replace him with another stooge. They kept him, just like other fellow dictators, as a useful leverage for their subversive politics in the region.

The West will surely keep Gaddafi and his regime intact the same way it has been keeping Saddam, ever since it created him, obviously for the main motive of striking hard at their countries as "an alien culture" (IH Tribune) much too feared by the West.

Sincerely
Al-Amily

# P.I.V.

SAT esperas baldaŭ aperigi la novan "Plena Ilustrita Vortaro"-n. Ĝis tiam SAT-anoj rajtas antaŭpagi je rabato - detaloj en Sennaciulo.

## Broŝurservo de SAT

Inter 1968 kaj 200 aperis pli ol 200 broŝuroj pri diversaj temoj. SAT-anoj trovas kontakt-detalojn en la adresaro kiun ĉiu ano ricevas.

## Ĝuinda Okazo

Mi volas diri kelkajn vortojn pri la lastatempa SATEB-Semajnfino ĉe Barlastono . Nu, mi estas relative nova ano, do vojaĝante al Barlastono mi eksentis iom da ekscito kaj fakte, iomete nervoza pri la venonta kunveno.

Tamen, alveninte tiun belan lokon apud Stoke-on-Trent, mi tuj renkontis gekamaradojn el Britio kaj eksterlando, kaj mi vere devas diri, ke ĉiuj ili estis tre afablaj homoj. Poste, post bongusta manĝo okazis la interkona vespero, kiu estis tre amika kaj amuza afero.

Dum la semajnfino mem, la diversaj diskutoj kutime estis spritaj, kaj la du prelegoj de nia gastpreleganto (Princo Henriko el Nigerio) pri Islama Juro kaj "Shell Oil" en Nigerio estis ege interesaj, sed samtempe iom ĝenaj.

Sabaton, dum la distra vespero, ni estis regalitaj de duobla-pianludado, spektakla fajro-manĝado (de K.do Mark Palmer), kaj ni estis tute ravitaj de ege profesia akordionisto kaj lia ĉarma familio el Rusio.

En la kolegio mem, ni ĝuis belegajn tri-pladajn manĝojn. La ĉambroj estis tre komfortaj, kaj la personaro tie estis tute amika kaj helpema. La kolegio situas inter belaj kaj pitoreskaj ĉirkaŭaĵoj – plenplena kun skultptaĵoj kaj arboj el diversaj landoj. Ankaŭ ni ne forgesu la festenan etoson el la loka trinkejo!

Mallonge, mi ne hezitas rekomendi la SATEB-semajnfinon 2002, kiu evidente gravas por nia movado. Plue, bonajn geamikojn vi trovos tie; kaj dum vi diskutados kaj kune amikiĝos, do vi sekve perfektos vian Esperanton en tia belega kaj komforta ĉirkaŭaĵo.

Robert Blow

# * S.A.T.E.B *

(Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio - *SAT in Britain*)

SATEB's main objective is to help ordinary people to communicate throughout the world on social, political and worker matters, injustices etc. This is done in conjunction with the parent organisation SAT and by means of the relatively simple international language Esperanto.

SATEB offers:- Contact with, and introduction to, SAT; Help in learning Esperanto; Regular contact through the journal "La Verda Proleto"; Book service; An annual conference weekend in Britain giving opportunities to practice the language, listen to foreign speakers about other parts of the world, and discuss political, social and similar subjects.

SATEB makes contacts with socialist, trade union, co-operative, peace, and similar movements in Britain and provides local support for SAT, which publishes a regular journal, a literary review, and various books etc. as well as holding an annual congress in various parts of the world

**For further information** please complete the form below and send to the secretary: Anne Johnson, 42 Beresford Rd, Islington, London N5 2HZ, or send an **email** to arturo@signalprent.demon.co.uk

Membership (including "La Verda Proleto"):£5 (for those with low incomes the minimum is £2)

*Renewals:- send form to treasurer (address on p 2)* Realiĝoj:- sendu formularon al la kasisto (adreso p 2)

*cut* > - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - < *tranĉu*

☐ *Please send more information* Bonvolu sendi pli da informo
☐ *Please send membership form* Bonvolu sendi aliĝilon
☐ *Membership renewal* Realiĝo

*Name* / Nomo ______________________________

*Address* / Adreso ______________________________

______________________________

(*optional* / nedeviga)> *Phone* / Telefono ____________ *email* / retpoŝto ______________________

*Date:* Dato:________________ ☐ *Tick the box if we may your details to other Esperanto organisations* Marku se ni rajtas sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto organizaĵoj

*I enclose* / Mi kunsendas :- *subscription* / kotizo £_________ *donation* / donaco £__________

*Total*: £__________ Sumo *cheque/PO/other/*________________ ĉeko/poŝtmandato/alia *cheques payable to* ĉekoj pagendaj al "SATEB"

## LASTATEMPE APERIS en Sennaciulo

(*Recently appeared in Sennaciulo*)

Junio  Raportoj pri manifestacioj je la 1-a de Majo en Bruselo, Londono, Berlino, San-Paulo, Parizo, Salorluks (Luksemburgo).  (*Reports about various 1st of May demonstrations*)

Raporto pri kunveno en Kebeko por krei pli vastan merkaton en Ameriko.  (*Report on a convention in Quebec about a proposal to create a large American market*).

Raporto (de Nathan Gant) pri konversacio inter li kaj N I Sekvojo (kondamnito, laŭ la opinio de multaj, pro agadoj por subteni la rajtojn de indianoj) kiu esats en Usona malliberejo.  (*A converation with N I Sekvoja who faought for Indian rights but is now in a US condemned call*)

Jarraporto de SAT, kiu diskutiĝos dum la kongreso en Nagykanisza (vidu la lasta LVP), kaj pliajn informojn pri la kongreso mem.  (*SAT annual report.  Details about the congress where it is going to be discussed*)

Diversaj novaĵoj el Hispanio, inklusive komplikaĵojn pri la proponita ĉesado de deviga militservo. (*Various news from Spain including the delay in abolishing compulsory military service*)

Raporto pri la per-retpoŝta diskut-grupo.  (*Report from the SAT email discussion group*)

# Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT

**Monda asocio de laboristoj, uzante Esperanton**

Celas faciligi kontaktojn inter laboristoj (en la pli vasta senso de tiu vorto) tra la tuta mondo kaj uzi kaj antauenigi la lingvon Esperanto.  Ĝi eldonas la organon "Sennaciulo", per kio la membroj kaj prezentas kaj informiĝas pri laboristaj aferoj, sociaj situacioj, (mal)justecoj, ktp.  Ĝi eldonas "Sennacieca Revuo"-n (literatura kolekto), librojn kaj broŝurojn kongrue al la celoj, kaj laŭ necese vortarojn, aliajn librojn, ktp.

La strukturo kaj organizado de SAT estas demokrata kaj ne baziĝas sur naciaj limoj.

SAT kongresas ĉiujare en diversaj mondo-partoj, "Sennaciulo" aperas preskaŭ ĉiumonate, "Sennacieca Revuo" aperas jare.  Adresaro, (regule ĝisdatigita), ebligas rektajn kontaktojn inter la anoj.

Membro-kotizo: £31 (malriĉuloj, kiel senlaboruloj, emerituloj, studentoj, rajtas pagi £15.50).  Membroj ricevas "Sennaciulo"-n, "Sennacieca Revuo"-n, kaj adresaron. kaj rajtas rabaton por kongres-kotizoj.
Nemembroj rajtas aboni al "Sennaciulo" kun "Sennacieca Revuo" kontraŭ £34.  Por Sennacieca Revuo (aparta) sendu FrFr40.00 plus bank- kaj poŝt- kostoj al Parizo, aŭ £5 al la peranto.

Oficejo: SAT, 67 Ave Gambetta, F-75020 Paris, France.  Retadreso: satesper@noos.fr>
TTTpaĝo: http://www.multimania.com/satesperanto

**Uzu la suban formularon por informpetojn kaj pagojn por Britio**, kaj sendu al la peranto:
Arturo Prent, 7 Walton Gdns, Hutton, Brentwood, Essex, CM13 1EJ    (Ĉekoj pagendaj al "SAT")
Retadreso: arturo@signalprent.demon.co.uk

*tranĉu* >- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

sendu al la peranto (vidu supre)

☐ Bonvolu sendi pli da informo pri SAT ☐ Bonvolu sendi aliĝdeklaron ☐ Bonvolu sendi informon pri kaj aliĝilon por la SAT Kongreso ☐ Realiĝo / abono

Nomo ______________________________

Adreso ______________________________

______________________________

(nedevigaj)->  Tel: ______________  retadreso: ______________

Dato ______________  Marku la skatolon se vi volas permesi al ni sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto organizaĵoj ☐

Mi kunsendas:-  kotizon £________ + donacon* £________ Sume:- £_________ (Ĉekoj al "S.A.T.")

per ĉeko/poŝtmandato/______________  *celo por donaco______________________